

Redakta noto

Kelkfoje ŝtatoj asertas, ke ili kulturamas amikecon inter si. Propradire, tiu ĉi amikeco estas esence neimagebla. Ĉu ĝi konsistas el tio, ke ĉiuj anoj de iu ŝtato estas amikoj kun ĉiuj anoj de la alia? Aŭ ĉu nur la respektivaj ŝtatestroj estas amikoj, unu kun la alia? Nu, ŝajnas ke multaj kaj detalaj klarigoj estas necesaj por klarigi, el kio konsistas amikeco inter ŝtatoj. Antaŭnelonge dek novaj ŝtatoj aliĝis al Eŭropa Unio. Ĉu pro amikeco? Pro profito? En la EU-Parlamenton ili sendas, same kiel la "malnovaj membroj", delegitojn pri kiuj ili kredas ke ili kapablas "tiri el EU la plej multajn avantaĝojn por la propra lando".

Koncerne Eŭropon, la veraj eŭropanoj fakte estas nur la esperantoparolantaj ŝtatanoj. Ili ne daŭre demandas, kiun avantaĝon ilia hejmlando havas pere de la EU-membriĝo. Ili ne daŭre plendas, ke la eŭropmona "eŭro" devalutigis la belan iaman propralandan monsisitemon. Ili ne daŭre ĝemas, ke malfermaj landlimoj plifaciligas migradon en la propran landon kaj perdigas laborlokojn. Esperantistoj scias, ke Eŭropo kaj kulturo estas sinonimoj, ke nia komuna mono estas la videbla fino de la epoko de naciismo kaj interŝtataj militoj en Eŭropo. Kun diversaj, tamen komunaj kulturoj Eŭropo fariĝis Eŭropo, kaj ne celas nuran ekonomian komunumon, nuran komercan kuniĝon por memutilo kaj memprofito. Sed la interŝanĝo de kulturoj, tiom diversaj ĉe nun 24 eŭropaj membroŝtatoj, postulas egalrajtan komunikadon per neŭtrala internacia lingvo.



Vekiĝu, fraŭlino Eŭropo! Ni, la esperantoparolantaj sciencistoj, tehnikistoj kaj interesatoj pri sciencaj aferoj jam delonge kontribuas, eŭrop- kaj mondavaste, al vere kultura kaj scienca interkomunikiĝo.

Mi deziras distran legadon de tiu ĉi lasta SR-kajero de la jarkolekto 2004!
Prof. d-ro R. Sachs, prezidanto de ISAE

**Laboristo,
Arbeiter, ouvrier, workman, raboĉij, obrero, operaio
– etimologiaj kaj semantikaj rimarkigoj
pri la plurlingveco de Eŭropo**

Wolfgang VIERECK

Antaŭrimarkoj

Mia okupo pri ĉi tiu temo estas frukto de mia laboro pri la tuteŭropa projekto *Atlas Linguarum Europae*, la eŭropa lingvoatlaso. Ĉi tiu projekto jam ekzistas ekde tri jardekoj. Ĉiuj eŭropaj landoj partoprenas ĝin. Bulgario denove ek de 2002. Tio estas bona ekzemplo por la efikoj de lingvopolitikaj decidoj. Pro tio, ke la bulgarioj ne rekonis la makedonan lingvon, sed konsideris ĝin kiel okcidentbulgarajn dialektojn, ili ne nur ekzistis el la eŭropa lingvoatlaso antaŭ dudek jaroj, sed eĉ el la tutslava lingvoatlaso, la *Obščeslavjanskij Lingvistiĉeskij Atlas*. Sed antaŭ malmulte da jaroj la bulgara ŝtato rekonis Makedonion kiel ŝtaton kaj la makedonan lingvon kiel memstaran lingvon. Tio ebligis, ke la bulgaraj sciencistoj povis reveni al nia projekto. Memkompreneble ni tre ĝojas pri tio. Mi ne opinias, ke la makedona en nur malmultaj jardekoj tiel malproksimiĝis de la bulgara, ke oni povas karakterizi ĝin kiel memstaran lingvon. La malfacilan lingvistikan problemon „Kio estas dialekto?“ kaj „Kio estas lingvo?“ oni ja ankaŭ povas solvi politike per unusola streko de la plumo. Ion similan ni spertas en aliaj regionoj de la eksa Jugoslavio koncerne la serbokroatan. Oni nun parolas je la malplezuro de multaj eĉ pri kvar lingvoj: la serba, la kroata, la montenegra kaj la bosnia. La politiko havis influon ankaŭ ĉe la diferencigo inter la rumana kaj la moldava. Kiel ekzemplon el la sudo de Eŭropo, oni rigardu la ekscitiĝeme faritan debaton pri la leĝa stato de la valencia. Ĉu ĝi estas dialekto de la kataluna aŭ aparta lingvo? Oni povas menciigi konsiderindajn ekzemplojn ankaŭ el la centra Eŭropo. Tiele la malaltgermana respektive basgermana estas levita ekde januaro 1999 al regiona lingvo kaj de tiam estas sub la protekto de la eŭropa lingvoĉarto.